

Li kaj ŝi. /D. Chalupa./

Li : Ho!

Ŝi : Ho!

Li : Ho!

Ŝi : Ĉu vi diris ion, karuleto?

Li : Jes, ...mi diris : Ho! kiel bele brilas la suno.

Ŝi : Ho jes, kiel bele ĝi brilas.

Li : Sed ne, tio ne estas la suno, tio estas la luno.

Ŝi : Luno? Vere? Mi eĉ ne rimarkis tion!

Li : Ho!

Ŝi : Ho!

Li : Mi opinias, ke morgaŭ pluvos.

Ŝi : Mi ne scias.

Li : Domaĝe.

/Averta signalo do aŭtomobilo/

Ŝi : Ĉu vi aŭdis? Kio ĝi estis?

Li : Ŝajnas al mi, ke najtingalo ekkantis.

Ŝi : Jes, najtingalo. Kiel bele ĝi kantas.

Li : Jes, belege.

Ŝi : Karuleto, mi sentas malvarmon.

Li : Alpremiĝu al mi. Mi varmigis vin.

Ŝi : Mi timas. Oni povus vidi nin.

Li : Neniu vidos nin. Estas ja mallume.

Ŝi : Ho!

Li : /Kisas ŝin/

Ŝi : /Ridas/ Vi kisis min sur la nazon!

Li : Ĉu estas mia kulpo, ke estas tia mallumo?

Ŝi : Ho vi estas mallertulo!

ekpluvas.

Li : Karulineto, ĉu vi amas min?

Ŝi : Vi ja scias, ke mi amas vin.

Li : Ĉu vi amas nur min?

Ŝi : Vi ja scias, ke nur vin.

Li : Ĉu vi venos morgaŭ denove?

Ŝi : Ne, ne, morgaŭ mi ne povos veni.

Li : Kial vi ne povus, se vi amas min?

/ektondras/

Ŝi : Mi amas vin, sed mi ne povos veni.

Li : Vi amas ankoraŭ iun alian. Ne vere?

Ŝi : Vi estas abomena!

Li : Vi estas malfidelulino!

Ŝi : Por ke vi sciu, jes, mi havas ankoraŭ alian amaton.

Li : Vi..vi.. perfida serpento. Bone, iru kun li, mi foriras.

/ektondras.

Ŝi : /Ekkrias/ Karlo! Atendu! Atendu! ne foriru! Mi timas tie ĉi, ne,
mi ne havas alian amaton. Karlo! Karlo! /la voĉo malaperadas/

Tradukis Th. Kilian

Třebíč, 28.4.1933